BRAZILA KONSILANTARO DE ESPERANTO
8-6 1974

# Conselho Brasileiro de Esperanto

BRASÍLIA – DISTRITO FEDERAL
Sede: Edifício Jockey Clube, sala 103
Setor Comercial Sul

CGC Nº
00406 504/1000-06

PRESIDÊNCIA
Rua Galeão Carvalhal, 31 – AP. 73
Telefone 4-8033
11.100 – Santos (SP)

SECRETARIA
Caixa Postal 07 – 1182
Telefone 226-1298
70.000 – Brasília (DF)

MARÇO/ABRIL DE 1981 | ÓRGÃO OFICIAL DO BKE | BOLETIM Nº 60

## II-A KONGRESO DE BRAZILA KONSILANTARO DE ESPERANTO

La evento okazos la 31-an de oktobro ĝis la 2-a de novembro, 1981.

Dum la vizito de la prezidanto F.S.Almada al Brazilio fine de februaro de la kuranta jaro, la direktoraro de BKE decidis pri la jeno: Ke la II-a Kongresso de nia organizaĵo okazu en la fino de la monato oktobro kaj komenco de novembro; ke la estatuto estu reformita kaj ke okazu balotado por la elekto de nova estraro al BKE.

En la agrabla sidejo de BKE, nun uzata de la LKK-Loka Kongresa Komitato de la 66-a UK, kunvenis la direktoraro en frata etoso.

La kampanjo por propra sidejo finiĝas la 30-an de aprilo de 1981-a kaj poste oni preparos la memorŝildon, kiu estos surmurigota en la ejo, Ĉiuj anoj, kiuj kontribuis per 10.000 kruzeroj aú pli vidos siajn nomojn aú firmaojn sur la plako. La solena inaúguro de la sidejo okazos dum la 66-a UK. Ni esperas, ke la anaro ĉeestu amase kaj ĝuu la fratecan kunvenon en la loko, kiun ili helpis aĉeti. Estos festo!

Pli detale ni informos, en venontaj numeroj de nia I. Bulteno pri la kongreso de BKE.

La tuta esperantistaro nuntempe klopodas ju pli bone organizi la 66-an UK' on. Ili laboras multe kun granda sindediĉo.

## TELEGRAFSTILE PRI LA 66-A UK

La aliĝkotizoj de la UK malaltiĝis, atentu!

1. Kongresano ne individua membro de UEA . . . . . . . . . . . .135 guldenoj.
2. Kongresano individua membro kun jarlibro. . . .113 "
3. Kongresano individua membro, kun jarlibro, kaj revuo Esperanto . . . . . . 80 "
4. Edzino de kongresano, kategorio nº 1 . . . . . . . 95 "
5. Edzino de kongresano, kategorio 2 aú 3 . . . . . 80 "
6. Junulo ĝis 20-jara 41 "
7. Studento ĝis 30-jara 68 "
8. Blindulo . . . . . . . . . 54 "

Interesatoj sin direktu al kasisto de la LKK, Poŝtkesto 13-2088 – CEP - 70.000 - Brazilio (FD), Carlos Augusto Siqueira da Cunha, ne forgesante, ke la valoro de la guldeno (florim) devas esti tiu de la dato, kiam oni sendas la monon de la aliĝo al la LKK. Estas, do interesse, ke oni sendu tuj la aliĝkotizon pro tio, ke la valoro de la guldeno estas modifata de tempo al tempo.

## MONO RICEVITA POR LA BULTENO

Ni kore dankas la jenajn kontribuaĵojn:

Gilberto A. Silva Velho. .750,00
Gilka Silva Velho. . . . . . 250,00
Roberto Gomes Freitas. . 100,00

| | |
|---|---|
| A. P. E. . . . . . . . . . . . . | 151,33 |
| Maximiliano de Oliveira . | 100,00 |
| Ary Zamora . . . . . . . . . | 850,00 |
| Hersila Valverde . . . . . . | 100,00 |
| José Dias Pinto . . . . . . . | 3.500,00 |
| Claudio Zimmermann. . . | 400,00 |
| João Fonseca . . . . . . . . | 100,00 |
| Dr. Modesto B.de Abreu . | 500,00 |
| Elvira Fontes . . . . . . . . | 500,00 |
| João Aguilera Jor . . . . . | 100,00 |
| Eleus L. de Sá. . . . . . . . | 300,00 |
| Itamar Batista de Castro . | 500,00 |
| | 8.201,33 |

**SPIRITA ELDONA SOCIETO F.V. LORENZ.**

Recebemos dessa organização distribuidora de livros espiritas, entre outros, o ALMANAKO LORENZ - 1981, que reputamos ótimo trabalho da aludida impressora, por isso que fornece excelentes informações, inclusive biografia do samideano Francisco Valdomiro Lorenz, um dos pioneiros do Esperanto no Brasil, Aconselhamos aos nossos leitores adquirir êsse Almanaque. Endereço: — Caixa Postal 3133 - 20.000 — Rio de Janeiro (RJ).

**GAZETOJ RICEVITAJ**

Ni ricevis kaj dankas la jenajn gazetojn, kiuj aperigas interesajn sciigojn pri nia movado: "Correio Fraterno do ABC", "Rio Grande" "Suda Stelo", "O Globo", "Sei", "A Caminho da Luz", "Jornal da Ciidade", "Gazeta da Bahia", "ZET-el Jugoslavio", "A Candeia", "Folha de Caçapava", "Folha Espirita", "Agora", "O Correio", "Diário de Guarulhos", "A Nova Era", "Bulteno SEK", "Tagiĝo", "Kvakera Esperantisto", "Svisa Fervojisto", "Seminario da Folha Metropolitana", "Folha do Suburbio", "Impakto" kaj "Diário de Guarulhos".

**SPECIALA POŜTMARKO OMAĜOS LA EVENTON**

Estas eldonota poŝtmarko kaj stampo de la 25-a de julio, kiu bone taúgas por afranki enlandan korespondaĵon.

Brazilia Super-radio, ĉiusabate matene, de la 8-a ĝis la 9-a horo disaúdigas informojn kaj intervjuojn pri la 66-a UK.

SENAC vaste diskonigas, ke en ĝia kadro okazos intensiva kurso de Esperanto de la 4-a de majo. La materialo estas eldonita de la organizaĵo por la instruado.

**"BRAZILO KANTAS PREPARE DE LA 66-A"**

Sub tiu titolo la revuo "Esperanto" de januaro prezentis la teamon, kiu direktita de Sylla Chaves produktis novan diskon en Esperanto. Jam pasintjare okaze de la karnavalo BEL eldonis diskon, kiu estis favore recenzita de la internacia gazetaro. Tiu gratulinda fak-agado vekis intereson en la rondoj de la kantemuloj kaj LKK jam ricevis la jenan telegramon: "Rio Kantas prepare al 66-a UK, kion faras Brazilio?" La respondo polemike lakona tekstis: "Brazilio laboras"- El tagiĝo.

**1–A TEJK**

La 1-a Tutlanda Esperanta Junulara Kunveno celas la kreadon de lokaj Asocioj de BEJO. Ĝia Organiza Komitato estas: Prezidanto: - Marco Antonio Dutra; Sekretario: - Marcio Manhês Folly; Komitatano pri Informado, Kulturo kaj Publikaj Rilatoj: - Roberto Odilon Horta; Komitatano pri Sportaj Aferoj: - Alexandre Fausto de Souza; Komitatano pri Financo kaj Administrado: - Tânia Mara Zebende dos Santos.

La kinveno okazos de la 17-a ĝis la 19-a de aprilo, 1981, en Nova Friburgo - (RJ). La aliĝkotizo ĝis la 31-a de marto: Cr$ 200,00; post tiu ĉi dato, Cr$ 400,00. La adreso por la 1-a TEJK: Caixa Postal Nº 324 Nova Friburgo (RJ) - CEP 28.600.

La 16-an de aprilo, de la 16-a ĝis la 24-a horo estos deĵoranto ĉe la aútobusa stacidomo, por atendi la atiĝintojn.

**PROVIZORA PROGRAMO:**

La 17-an/04/81 - Vendrede
9h00 Solena malgermo/Unua labor-kunveno
12h00 Tagmanĝo
14h00 Promenado
18h00 Vespermanĝo
20h00 Arta Horo

La 18-an – Sabate

9h00 Prelegoj
12h00 - Tagmanĝo
14h00 - Laborkunveño
16h00 - Intertempo
16- 20 - Prelegoj
18h00 - Vespermanĝo
20h00 - Arta Horo

La 19-an - Dimanĉe
9h00 - Sportludado
12h00 - Tagmanĝo
14h00 - Lasta Labor-kinveno-Decidoj
18h00 - Vespermanĝo
19h00 - Muzikfestivalo-Diplomdisdono
22h00 - Solena Fermo

La 20-an kaj 21-an/04/81-Lunde kaj marde okazos tendaro ĉe "Cascata Conde D'Eu".

Tiu Unua Tutlanda Esperantista Junulara Kinveno estas komuna aranĝo de Friburgo Esperantista Junulara Organizo (FEJO), Rio de Janeiro Esperantista Junulara Organizo (REJO) kaj Niteroi Esperantista Junulara Organizo (NEJO), la tri unuaj lokaj asocioj de la Brazila Junularo.

Helpu ni la Junularon! ! ! Ili estos niaj anstataúantoj!

## ESPERANTO EN PRAKTIKO

Prof-ro D-ro Wolfgang F. Schmid, prezidanto de la Internacia Grupo Informo Scienca I G I, sendis al nia redaktejo la jenan leteron kies tekston, li petis, ke ni publikigu:

"Okazis 1980-12-29-31 em Budapêsta Teĥnika Universitato internacia informadikista laborkonferenco. La partoprenintoj decidis fondi Internacian Grupon Informo-Scienca IGI (hungare: Nemzetkozi Számitás-technikai Munkacsoport, germane: -Internationale Gesellschaft für Informatik, nederlande: Internationale Wekgroep Informatica).

IGI celas samrangan internacian fakan kunlaboron en informadiko, ĉefe en la kampo de necifera informprilaborado. Tial - kvankam IGI ne estas esperantista grupiĝo, la Internacia Lingvo estos ties unua, sed ne la sola laborlingvo.

IGI kunigas la tiucele samtempe fonditan Komputistan Sekcion de ISAE kaj la jam ekzistantan laborgrupon pri automata lingvoprilaborado de Eúropa Klubo; tio ne signifas, ke ĉiu membro de IGI estu membro de ambaú tiuj ĉi organizaĵoj.

Ĝis la fino de 1981 oni decidos pri eventuala jura memstareco de IGI, resp. pri evt. kontrakto inter ISAE - aú UEA - kaj Eúropa Klubo pri IGI, resp. pri alia regularo por la IGI-laboro. Intertempe oni ankaú serĉu la kinlaboron aú kunigon kun eble ekzistantaj aliaj informadikistaj fakilaroj.

Fariĝis prezidanto de IGI Prof. D-ro Wolfgang F. Shmid, Flensburg (FR Germanio), kaj sekretario D-ro Inĝ. Peter Broczkó, Budapeŝto (Hungario); estrarano pri perkomputiiaj esploroj fariĝis Inĝ. Jan Otto de Kat (Nederlando)".

Ni dankas la kunlaboraĵon.

## TRA BRAZILO
### GARANHUNS (PE)

Kvankam en tiu urbo la klubo estas eta kaj juna, ili organizis la II-an Regionan Renkontiĝon en la pasinta jaro. Dank' al la laboro de sam-ino Maria do Socorro Monteiro kaj aliaj gesamideanoj. Ili solaj solvis la organizan problemon kaj bonege ekceptis la partoprenintojn, kiuj laúdis la eventon.

La urbestro, Sr-o Ivo Amaral, neesperantisto, apogis plene la laboron de la esperantistoj.

Ni deziras, ke la movado bone progresu en tiu urbo, ĉar la anaro estas laborema kaj klopodas pligrandigi la nombron de la esperantistoj.

### ILHEUS (BA)

Kiel ĉiame nia vicprezidanto Eleus de Sá laboras sur ĉiu kampo por disvastigi la Internacian Lingvon.

Li aúdace kaj lerte proponis al la aviadil-kompanio Varig, ke ili enkonduku Esperanton en ilian komercon.

Ankaú por la "Editora Abril Ltda". li sendis informojn pri la internacia lingvo cele, ke la kompanio utiligu ĝin en sia eldonaĵo "Almanaque Abril".

Li estas kunlaboranto de kelkaj bonaj gazetoj, kiuj publikigas artikolojn pri la esperanta movado.

La 14-an de februaro, dum la festeno

de Castro Alves, li havis okazon deklami en Esperanto la poezion "Mia lando havas palmon, kie kantas sabiá", antaŭ granda nombro da intelektuloj. Je la tago 15-a en la sama monato li faris paroladon en la urbo Camamu, kie prof-ino Maria Elizabete G. Pereira ekinteresiĝis pri Esperanto kaj nun ĝin lernas. S-ano Eleus helpas tie la kurson.

Ni deziras al nia diligenta kaj senlaca kunlaboranto daŭran sukceson. Nia movado urĝe bezonas teamon el homoj egalaj al S-ano Sá. Ni dankas la informojn.

SALVADOR (BA)

Alia bona batalanto el ŝtato Bahia estas s-ano José Saraiva Matos, kiu sendadas al ni la periodaĵon "Impakto" el tiu urbo ĉarma. La "Impakto" aperigis bonegan artikolon pri Esperanto. Ĝi temas pri spirita mesaĝo de nia neforgesebla Iŝmael Gomes Braga, kiu ne forgesis nian movadon kaj fojfoje klopodas helpi nin.

Ni dankas al s-ano Saraiva la kunlaboraĵon kaj liajn afablajn vortojn rilatajn al la Semajno de la Internacia Amikeco".

BELO HORIZONTE (MG)

Plezurigis nin la sciigo, ke en Belo Horizonte, kvankam silente, la movado antaŭen marŝas kontentige. S-ano Paulo Roberto dos Santos sendis leteron al ni informante, ke la 28-an de februaro finis la esperantan kurson 12 gelernantoj ĉe "União Espirita Mineira", kiuj bone scipovas la internacian lingvon.

La 7-an de marto komenciĝis nova kurso, kiu daŭros ĝis la 66-a UK. La kursojn gvidas s-anoj Said Pontes de Albuquerque kaj Paulo Roberto dos Santos.

Ĝojigas nin la bona informo kaj la diligenta klopodado de niaj s-anoj, kiuj pere de dediĉita laboro rekrutas novajn esperantistojn por nia movado. La plej grava laboro estas instrui la lingvon.

Ni kore dankas la afablajn vortojn de niaj s-anoj rilate nian laboron. Ni amike reciprokas la bondezirojn, ĉar vi meritas. Volu sendi akurate bonajn novaĵojn.

Gratulon.

RIO DE JANEIRO (RJ)

La redakcion atingis diskoj da la aŭtoro Prof-ro Sylla Chaves kaj libroj "Lernu kantante". Ni aŭskultis ilin kaj trovas, ke ili estas bonaj amuzaĵoj, ne nur por tiuj, kiuj ŝatas muzikon sed ankaŭ por lerni Esperanton pere de tiu sistemo. La interesatoj volu sin turni al BEL - Praça da República, 54 2º – CEP 20211 – Rio de Janeiro (RJ). Ni dankas la donacon.

VOLTA REDONDA (RJ)

Kiel ĉiam, inĝeniero Alberto Flores faras bonan propagandon pri la Internacia Lingvo. La spiritisma periodaĵo "A Caminho da Luz" aperigis lian artikolon titolitan "Vantagens Educacionais do Estudo do Esperanto", kiun ni trovis tre interesa. En tiu progresema urbo la radio kaj gazeto ofte propagandas pri nia movado kaj kelkaj junaj esperantistoj agadas tie en spiritsmaj medioj.

Ni gratulas kaj deziras sukceson.

BAURU (SP)

Prof-ro Antonio João Fraga Padilha estas nia informanto el tiu grava urbo de la Ŝtato San-Paŭlo. La Baurua Esperanto Societo senĉese gvidas kursojn. La "Escola Progresso" en sia flugfolio informas: "Curso de Reforço para 1º Grau e de 1-a e 8-a séries, Português, Matemática, Inglês, Francês e Esperanto, língua internacional".Tio signifas, ke ekzistas senĉesaj kursoj, kiujn gvidas instruistoj, inter ili troviĝas Prof-ro Antonio João Fraga Padilha.

Krom la instruado de Esperanto la Societo realigas kampanjon por konstrui propan sidejon. La tereno jam estas aĉetia, sed oni devas prizorgi la konstruaĵon.

Kiu voltas helpi la bonajn Bauruanojn, volu sendi la kontribuaĵon al Sociedade Bauruense de Esperanto-Rua Alice Vieira Ranieri, 2-56- CEP - 17.100 - Bauru (SP). Dankon!

SOROCABA (SP)

La Sorokaba Esperanto-Klubo daŭre laboras por akiri monsumon kun celo aĉeti

propran sidejon. Ili vendas "brikojn" je Cr$ 350,00 kaj iom post iom ili kreskigas la sumon destinotan al la afero, cetere tre bezonatan. Ili ankoraŭ havas sufiĉe da brikoj. Kiuj volas partopreni tiun kampanjon?
- Sumo estu sendata al la adreso: Sorokaba Esperanto Klubo - Manoel Blaz Garcia - Av. S. Paulo, 1494 - CEP 18100 Sorocaba (SP).
- La klubanoj gvidas kursojn en diversaj spiritismaj institucioj. Al kontribuonto koran dankon.

## SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO

Kiel programite la anoj de Sorokaba Esperanto-Klubo, ĉe frateca etoso, kaj komencante unu tagon pli frue, bone festis la "Semajnon de la Internacia Amikeco", kiu estis inaŭgurita sabate je la 19-45 horo, kun paroladoj, fare de Manoel B. Garcia kaj Eluizio Bueno Rodrigues). Sekve, en la Arta parto la aranĝo kulminis kun la lanĉo de memoriga filatela stampo de la loka Poŝtoficejo, por omaĝi la belan iniciaton, kiu validas por la periodo de 21 ĝis 27/02/81, enhavante la jenan diraĵon: "12-a Semana da Amizade Internacional" - Vivu ni en Paco sub la sama Suno-21 a 27/II/81 (kaj en la centro troviĝas 5 - pintastelo) - ECT-Sorocaba - SP".

Planite de ĝia diligenta kasisto Eluizio, SEK eldonis (Presigis) por amase disdoni informan flugfolion, celantan dissendi inter la publiko la ideon kaj la grandan meriton de la internacia amikeco kaj la Semajno - kies kreinto estas la inteligenta kaj bonkora svedo Eric Carlén

Plue, la 24-an, marde, je la 20:00 horo okazis parolado kaj modesta kulturfesto pri la Semajno de Internacia Amikeco ĉe Spiritisma Centro "Batuira". Kaj la E-Grupo de tiu Centro aktive partoprenis kaj kantis la esperantistan himnon "La Espero"; ankaŭ s-ano Daniel A. Giroto deklamis "Preĝo sub la Verda Standardo" kaj s-ino Kantilia de Oliveira kantis plaĉan brazilan kanzonon, antaŭ la ĉeestantaro kaj la publiko mem. Oni ankaŭ reliefigis la agadon praktikan de la belgoj, vere imitindan, okaze de la Samajno de Amikeco, liginte iliajn aranĝojn kaj sukcessojn.

Kelkaj ĵurnaloj kaj periodaĵoj de la regiono informis pri la evento (Cruzeiro do Sul, Sorocaba; Diário Popular, São Paulo; A Federação, Itu; Internacia Informilo, de SEK; Radio Clube de Sorocaba mem kaj aliaj). Ankoraŭ multo estas farenda por ke tia manifestiĝo atingu kontentigan kaj prosperigan nivelon.

La koverto ankaŭ fariĝis trafa propagandilo de la evento.

## CAMPINAS (SP)

La 7-a San-Paúlo- Esperanto-Renkontiĝo okazos de la 1-a ĝis 3-a de la venonta majo-1981-a en la Ruĝa Salono de la urbestrejo de tiu urbo.

Tiu renkontiĝo celas vigligi la Esperanto-Movadon en Campinas kaj ni invitas ĉiujn gesamideanojn partopreni ĝin. La aliĝkotizo estas Cr$ 200,00 kaj la monon oni sendu al Esperanto-Asocio de San-Paúlo - Rua Faustolo, 124 - Agua Branca – CEP - 5041 São Paulo (SP).

Campinas estas malvona centro de la Esperanto-Movado en Brazilo. En tiu urbo aperis la unua gazeto pri la movado, titolita "Suda Stelaro" kaj tie estis fondita la unua Esperanto-Societo. Jam vigle agadis tie la anaro; poste ĝi stagnis, sed nun ree oni volas restarigi ĝin, kio ja estas tre laŭdinda afero. Ni gratulas la iniciatojn, Ĉe la fino de aprilo okazos Esperanta Semajno tie.

## CAÇAPAVA (SP)

Unu el la plej bonaj kunlaborantoj de la brazila Esperanto-Movado, sendube estas s-ano Gilberto Silva Velho, el Caçapava, nia vicprezidanto.

Li zorgas pri la artikoloj en la naciaj gazetoj kaj esperantaj periodaĵoj, en kiuj efike propagandas pri la movado.

Li ankaŭ prizorgas parte la skoltan movadon kune kun Eluizio B. Rodrigues el Sorocaba.

Nuntempe s-ano Silva Velho pritraktas kurson ĉe la "Nucelo das Cruzadas Militares" en tiu urbo. Inter la gelernantoj troviĝas D-ro José Urzedo da Cruz, prezidanto de Rotary Clube de Caçapava.

De la 10-a ĝis la 14-a de aprilo Caçapa-

va festas sian datrevenon kaj s-ano Gilberto planas fari propagandon pri la internacia lingvo. Li posedas abundan materialon por ekspozicioj.

Konstante li kunlaboras kun pluraj gazetoj el la regiono kaj estas unu el la plej bone informitaj personoj pri nia movado en Brazilo.

## GUARULHOS (SP)

D-ro Lacorday Andrade, nia vicprezidanto, organizis en tiu urbo Esperanto-kurson, al kiu aliĝis pli ol 60 interesatoj. Inter ili troviĝas la edzino de la urbestro, s-ino Laura de Castro Tales, la universitata Prof-ro D-ro Laerte Romualdo de Souza, la urba leĝfaranto Elizo Rosignoli kaj studentoj, ĉiuj intencas partopreni la 66-an UK'on.

La revuo ACIG ("Associação Comercial e Industrial de Guarulhos"), la "Folha Metropolitana", la "Diário de Guarulhos" kaj la loka Radio disvastigas Esperanton en la urbo kaj ĝia regiono. Dankegon al tiuj gravaj kunlaborantoj.

La malfermon de la kurso partoprenis la Prof-ino Elvira Fontes de la EASP. La kurso daŭros ĝis la okzigo de la 66-a a UK.

Ni gratulas s-anon Lacorday Andrade kaj deziras sukceson al liaj gelernantoj. Tio estas tre imitinda ekzemplo.

## SÃO-PAULO (SP)

La Esperanto-Asocio de San-Paúlo kunlaboras kun diversaj naciaj gazetoj. Prof. Elvira Fontes verkas ciudimanĉe artikolon pri la internacia lingvo por "Diário Popular". Gvidas korespondanı kurson kaj ĉiutage deĵoras en la sidejo de la Societo.

Prof-ro Deodato de França Mello, siavice aperigas artikolojn en la gazeto "Folha da Tarde".

Dum ĉiu lasta sabato de la monato EASP organizas kulturkunvenon. La tri elementajn kursojn kaj du konversaciajn prizorgas la jenaj kunlaborantoj: Amelia M. Hamada, Deodato França Mello, Francisca Martos, José Luiz Pereira kaj Waldir L. Rocha.

La prezidantino Elvira Fontes kunordigas la 7-an Esperanto-Renkontiĝon en Campinas por la komenco de majo de 1981.

La 22-an de januaro la radielsendisto Marcia Priolli Palma, de la "Radio Excelsior", intervejuis prof-rinon Elvira Fontes kun granda intereso pri la internacia lingvo.

## SANTOS (SP)

La elementa kurso ĉe Ismenia de Jesus daŭras sub la gvido de nia juna s-ano Pedro Jacintho Cavalheiro.

La gazeto "A Tribuna" aperigas ofte artikolojn de la prezidanto de BKE, Prof-ro F. S. Almada.

En Santos la organizaĵo Centro Esperantista de Santos ne havas sidejon por la Esperanto-Movado kaj pro tio estas malfacile organizi kursojn kaj efike agadi.

La 1-an de aprilo estos inaŭgurita ekspozicio pri pentro-arto en salono ALHAMBRA,kiu daŭros ĝis la 12-a de la sama monato, promociita de la "Associação dos Artistas Plásticos do Litoral Paulista", kiun partoprenos ankaŭ s-ino Maria Almada inter aliaj artistoj.

## PORTO ALEGRE RS)

La Esperanto-Societo Porto Alegre post 22 jaroj da ekzistado elektos novan estraron. La renovigo de tiu estraro estas ĉiam utila, ĉar ebligos al diversaj personoj aktive laboradi.

D-ro Ernani Dias Correia, la ĝisnuna prezidanto bone laboris kaj laboros. Li kiel progresema intelektulo decidis rekruti novajn fortojn, ĉar la movado en nia epoko tion postulas. Ni bezonas dinamikajn kaj laboremajn esperantistojn, teamojn, kiujn antaŭenpuŝu Esperanton en Brazilo.

Estas nepre necese, ke novaj elementoj aktivu, kaj la jam agantaj helpu al la nova estraro, postulo de la movado, kiu deziras la unuigon de la esperantistaro.

Ĝis nun bone marŝis la agado de ESPA, sed lastatempe la anaro pli vigle klopodas multobligi sian nombron.

D-ro Ivo Sanguinetti estis la organizanto kaj forta helpanto de la prezidanto Correia dum la okazigo de la 1-a Sudesperanta Renkontiĝo, kiu brile sukcesis, Dan'k al tiu evento la propagando pere de radio, TV kaj

kaj gazetaro la intereso pri la internacia lingvo kreskis inter niaj karaj gaŭĉoj.

Prof-rino Nydia A. Krieger gvidas plurajn elementajn kursojn en la Spirita Societo Allan Kardec.

D-ro Ernani Correia en la sidejo de ESPA gvidas kurson. S-ro H. Dionisio instruas daŭrigan kurson. D-ro Ivo Sanguinetti organizas folklorangrupon por la 66-a UK, instruante kanti la junularon de 5 ĝis 20 jaroj, utiligante Esperanton.

Li estas komponisto kaj tradukanto de belegaj kanzonoj el la gaúĉa vivo. Ankaú li redaktas la informilon Suda Stelo, bonega bulteno.

La balotadon sekvas granda interfratiĝâ vespermanĝo, kiun ĉeestos ĉirkaú 200 personoj. Sekve la propagando estas benega refoje, ĉar vekas la intereson de la neesperantistoj.

Kun granda atento ni esperas, ke la rezulto de la balotado estu kontentiga, ĉar inter tiom da bonegaj personoj, kiuj kinsistigas ESPA'on, la elekto ne estos tiel facila. Ni deziras sukceson kaj venkon al iu bona samideano, por la bono de ESPA.

### C A Í (RS)

BKE perdis sian fidelan kinlaboranton en tiu urbo. Nia vicprezidanto Otto Vaske iĝis radiamatoro. . . Li petis, ke ni diskonigu la jenan sciigon: "Estimataj gesamideanoj! Se vi ankoraú ne estas samhobianoj, bv. tuj fariĝi tiaj, En ĉiu unua kaj tria sabato, je la 16-a horo (19,00 GMT), inter frekvencoj 21.180 kaj 21.200 khz, servatas perradia verda-kafo. Partoprenu. Antaúdankas Vaske PY3ACE".

Estinte en Brazilio, en la domo de niaj karaj geamikoj Lucia kaj Enivaldo da Silva same radiamatoro, ni aŭdis paroladon de samideano Vaske, kiu salutis nin. Vere la radiamatorismo estas mirinda hobio, ĉar en la etero ne ekzistas limo por la komunikado, kiun favoras la lingvo internacia Esperanto.

### R I O G R A N D E (RS)

La gazeto "Rio Grande" aperigas interesajn artikolojn pri la internacia lingvo. D-ro Manoel T. de Abreu dilgente kunlaboras en tiu grava gazeto de la regiono. Tiu gazeto aperigis la 13-an de marto tutpaĝan artikolon klarigante la valoron de Esperanto kiel internacia lingvo, kaj la atingitajn sukcesojn de la Universala Esperanto-Asocio.

Laŭ tiu artikolo oni vidas tion, kio estas Esperanto, ĉar en la najbara urbo Pelotas (RS) ĉe la Federacia Universitato, en la porenira ekzameno la teksto estis: "Iu lingvo ne valoras por si mem, sed valoras la kulturo, kiun ĝi prezentas". Iu studento respondis, ke Esperanto ankoraŭ ne venkis, malgraŭ sia simpleco, ĉar ĝi ne havas esencajn, bazajn elementojn, kiel iu ajn alia kultura lingvo. Protio mankas al ĝi spirito kaj vivo; ĝi estas maŝineca por esprimiĝo. La vortoj estas logikaj, sed fridaj".

Je ĝi la klarigo certe surprizigis la legantaron de la gazeto, ĉar la artikolo estis logike riĉhava. Citas la aŭtoro, kiel atestojn, ke UNESCO rekonis la utilecon de Esperanto, ke ekzistas sennombraj gazetoj tra la mondo, libroj tradukitaj kaj originale verkitaj. Tra la mondo jam pluraj landoj enkondukis la internacian lingvon en siajn kurikulojn ktp.

### KVAKERA ESPERANTISTA SOCIETO

Adreso: - 12 Welland Road, Keynsham, Bristol, BS1B TPB - Britujo.

Ĝia periodaĵo estas la Kvakera Esperantisto.

KES estas frata kaj pacama FAK-Organizaĵo de UEA.

La anoj de la kvakera Societo deziras plibonigi la vivon, malarmigi la mondon uzante Esperanton. Kvakerismo estas religio.

### UTILIDADE DO ESPERANTO

O Dr. José Carlos Thomaz comunicou-se com a Rússia pelo Esperanto a fim de obter o medicamento "Interferon" que estava sendo anunciado como capaz de curar o câncer. Obteve dito remédio e agora o oferece a quem possa interessar. Pedido pelo Telefone 394-4433 - Rio de Janeiro, ou Rua Gianerini, 41 (Campo Grande) - 23.000 - Rio de Janeiro (RJ).

## BALANÇO GERAL – (31-12-80)

| | | |
|---|---|---|
| **ATIVO** | | |
| I - Circulante | | |
| CAIXA | 18.105,05 | |
| BANCOS | 29.299,61 | |
| C/CORRENTES | 9.534,60 | 56.939,26 |
| II - Realizável a longo prazo | | |
| BENS RECEBIDOS EM DOAÇÃO | | 7.000,00 |
| III - Permanente | | |
| IMÓVEIS | 320.000,00 | |
| MÓVEIS E UTENSÍLIOS | 28.400,00 | 348.400,00 |
| | | 412.339,26 |
| IV - Compensado | | |
| PROMESSAS E REGISTRO DE DONATIVOS SEDE PRÓPRIA | | 620.000,00 |
| | | 1.032.339,26 |

| | | |
|---|---|---|
| **PASSIVO** | | |
| I - Patrimônio líquido | | |
| FUNDO SOCIAL | | |
| - Exercício anterior | 223.051,02 | |
| - Exercício 1980 (incremento) | 189.288,24 | 412.339,26 |
| II - Compensado | | |
| DONATIVOS SOB COBRANÇA | 138.900,00 | |
| DONATIVOS COBRADOS | 481.100,00 | 620.000,00 |
| | | 1.032.339,26 |

## DEMONSTRAÇÃO DA CONTA LUCROS E PERDAS

| | |
|---|---|
| **DÉBITO** | |
| - DESPESAS C/BOLETIM INFORMATIVO | 36.971,70 |
| - DESPESAS DA SEDE PRÓPRIA | 54.310,77 |
| - DESPESAS C/CONGRESSOS PRÓPRIOS | 12.950,00 |
| - DESPESAS C/DONATIVOS A ENTID. ESPERANTISTAS | 7.825,00 |
| - DESPESAS GERAIS | 9.152,80 |
| - DESPESAS POR COMPENSAÇÃO | 860,00 |
| | 122.070,27 |
| "Superavit" transf. para a conta "Fundo Social" | 189.288,24 |
| | 311.358,51 |

| | |
|---|---|
| **CRÉDITO** | |
| - CONTRIBUIÇÕES PECUNIÁRIAS, RECEBIDAS | 29.752,44 |
| - DONATIVOS PRO-SEDE PRÓPRIA, RECEBIDOS | 247.000,00 |
| - RECEITAS DE CONGRESSOS PRÓPRIOS | 28.600,00 |
| - RENDAS DIVERSAS | 3.453,04 |
| - RECUPERAÇÃO DE DESPESAS | 2.553,03 |
| | 311.358,51 |

Brasília (DF), 31 de dezembro de 1980

F. S. Almada - Presidente — Nelson P. de Souza - Secretário

Carlos A.S. Cunha - Tesoureiro - CRC.SP 43.051 - CRC. S. DF 360

*Centro de Cópias Cerqueira Compôs e Imprimiu*